# KIEL DIRI TRIMANIERE

(14-A VIDEOLECIONO)

Celata publiko:

Lernintoj de baza kurso de Esperanto.

**LA GRAVECO HAVI EN LA MENSO PLURON DA ESPRIMOJ POR UZI.**

**Foje oni bezonas uzi kunmetaĵojn, lokuciojn, e-vortojn, vorterojn, vortetojn, vortkombinojn ktp, depende de la kunteksto.**

**En tradukado ankoraŭ pli, foje eĉ aldonante aŭ formetante afiksojn, nome de la pleja precizeco en la translingvigo kaj transkulturigo de ideoj.**

**Estas ĉiam bone variiigi la uzadon de la strukturoj, ekzemple inter sintezaj formoj, tiaj kiaj e-vortoj (mi vojaĝas aŭtomobile), kompleksaj formoj (mi vojaĝas per aŭtomobilo). Foje,anstataŭ diri "mi vojaĝos al Togolando" , oni povas diri "mi vojaĝos Togolandon aŭ Togolanden). Foje, anstataŭ "lavmaŝino", oni diru "maŝino de lavado". Vaste uzindaj estas ankaŭ la sinonimoj (de simplaj vortoj kaj ankaŭ de kompleksaj esprimoj). Ĉio tio estas uzenda, por ke oni alkutimiĝu paroli varie, riĉe, bunte kaj multmaniere.**

LA ESPRIMFARADO KAJ UZADO DE ELPAROLAJ MANIEROJ, GRAMATIKAJ LOKUCIOJ DEPENDAS DE LEGADO, PAROLAJ AŬSKULTADO KAJ PRAKTIKADO KAJ, POST FIRMIĜO DE BAZA STOKO,

LA INTUICIO, ĜIS LA NATURA MULTUZECO DE LA VARIAJ ESPRIMFORMULOJ POR DIRI SAMAJN AFEROJN.

**KIE KOLEKTI ESPRIMOJN por pli bone kaj pli varie vortigi ideojn kaj pensojn? Ĉefe en Dialogoj, teatraĵoj, filmoj kaj aliaj fontoj de konversacioj.**

**La varieco de esprimoj por diri samajn aferojn ankaŭ buntigas kaj pli beligas la parolon, ĉefe en parolado.**

**Krome la lerteco en la ŝanĝoj de esprimeldiroj solvas problemojn pri okazaj mankoj de memoro.**

**ESTAS GRAVA LA KONSTANTA LEGADO, SPECIALE ĈAR NE ESTAS REGULO EN LA TEKNIKO DE ALTERNADO INTER MALSAMAJ ESPRIMFORMULOJ.**

**LA FLUIGA MERGIĜO EN LA LIBROJN. Jen la natura medio de la esperantisto.**

**Por akiri sekurecon en la alternado de parolesprimoj, konvenas paroli malrapide. Tio estas strategio uzata de multaj. Per ĝi oni havas tempon elekti**

**la esprimformulojn de la vico kaj ankaŭ alterni pliriĉige inter ili.**

**LIBROJ: fonto de scioj, stiloj, lingviko, gramatiko kaj ankaŭ de esprimformuloj. Ĉar la publiko de la esperantaj libroj estas la tutmonda Esperantujo, elkolekti esprimformuloj el la libroj helpegas en ties unuformeco tra la mondo.**

**Fine, unu afero, ideo, fakto direblas ne nur trimaniere, sed plurmaniere, foje eĉ pli ol dekmaniere. Kiuj plej kapablas uzi tian plurmanierecon? Verkistoj, tradukistoj, poetoj kaj legemuloj, kiuj praktikadas ĉiutage la metion de la skribo kaj**

**la parolo.**